

La lastaj cent tagoj

Karaj!

En julio 2009 komenciĝis mandato de la nuna estraro de ILEI. Tiu nova teamo havis kelkajn klarajn planojn pri novaj direktoj kaj farendaj taskoj, sekve ĝi rapide ekagis por konkretigi la strategion kaj – sekvante nuntempan politikan modon – ni sentis la bezonon raporti pri la atingoj de la unuaj cent tagoj – la kutima ‘miel-luna’ periodo por nova registaro. Ni superis la ne-movadajn politikistojn; ni raportis post 30 tagoj, post 60 kaj denove post cent. Tiuj raportoj legeblas ankoraŭ en nia retejo www.ilei.info, sub ‘Agado > Superrigardo’. Tiu principo de regula raportado en kaj ekster ILEI figuris forte en la intencoj de la estraro, sub la devizo ‘Se oni laboras, sed ne raportas, estas kvazaŭ la laboro ne estis farita’ – kontraŭ kiu oni devas tamen citi alian devizon: ‘Se vi foruzas tro da tempo raportante pri laboroj, ne restos tempo por plenumi plian laboron!’ Espereble ni trafis konvenan ekvilibron.

Nun, ni ekfaros ion, kion faris laŭ nia imago, neniŭ realmonda politika administracio – ni raportas okaze de la LASTAJ cent jaroj. Limdatoj havas mirindan kapablon koncentri mensojn kaj akriigi la fokuson. Ni ekspluatitu tion. En la sekvaj cent tagoj ĝis nia konferenco, la estraro havas kelkajn bazajn, iuj statute devigatajn, taskojn:

- Kompilo kaj aperigo de la liga jarraporto pri 2011, inkluzive de la financaj rezultoj kaj membro-statistiko.
- Nia sekretario kompilos la raportojn alvenintajn de la landaj sekcioj pri iliaj agadoj en 2011, cele al reteja aperigo.
- La sama aganto kompilos aktualan liston de komitatanoj (kaj anstataŭantoj), valida por Kunmingo, ĉar en la 31a de marto 2012 (laŭ nia renovigita regularo) la sekciestroj devis anonci siajn komitatanojn por la sekva trijara periodo.

Al tiu baza listo, ni elektu el cent da ebloj nur manplenon da taskoj – i.a. tiuj plej gravaj por liveri solidan bazon por la nova estrara teamo:

- Finpretigoj por nia 45a Konferenco en Kunmingo (20-26 julio), en proksima kunlaboro kun LKK. Tio inkluzivas la okazigon de universitat-nivela simpozio, konkretigo kaj konigo de alven-gvido kaj plia varbado de partoprenantoj.
- Realigo de seminario pri instruado de Esperanto al fervojistoj kadre de la IFEF-Kongreso, surbaze de kursoskemo ellaborita por la 125-jara jubileo de Esperanto. Jen komencpunkto oferti instruistan trejnadon ekster niaj propraj rondoj.



Fragmento en la kurso-skemo

6. Bazaj prepozicioj

Sur la kajo estas lampo kaj sidbenko kaj horaro kaj pasaĝero kun valizo. La sidbenko estas inter la lampo kaj la horaro. La lampo estas apud la sidbenko kaj la sidbenko estas apud la pasaĝero kun valizo. Sed tiu pasaĝero ne estas apud la lampo. Mi estas la trajnestro. Mi promenas en la trajno. Mi estas la ĝardenisto. Mi laboras en mia ĝardeno. Mi staras sub la fruktarbo kun mia rastilo.

7. Resumo pri netransitivaj verboj – libera vortordo.

Trajno venas. Venas trajno. Promenas la trajnestro. La trajnestro promenas. La ĝardenisto laboras. Laboras li. Sidas la pasaĝero, li sidas sur komforta sidloko. Haltas la trajno. La trajno haltas. Dormas kaj ronkas la pasaĝero. Li estas ĝena. Ĝena li estas!

8. Transitivaj verboj

Saluton! Mi estas konduktoro. Mi havas flagon. Mi svingas la flagon.



Trajno venas. Venas trajno

- Partoprenado, kiom eblas, en ĉiaj jubileaj projektoj kaj celebrado, kune kun la sekurigo de la farita laboro por la 125-etapa kurso ILEI esperis krei, tiel ke ĝia kompletigo eblos estonte, kiam laborfortoj estos je dispono.

- Daŭrigo de la pretigo de gvidiloj, por ke kresku la kolekto nun legebla en nia retejo ('Dokumentoj > Gvidiloj') – prioritare estas gvidiloj, kiuj kovras la diversajn task-priskribojn de la estraraj postenoj, por helpi al la elekto-komisiono varbi novajn kandidatojn por 2012-2015, kaj por helpi al kandidutoj decidi ĉu kuraĝi aŭ ne.
- Lastaj provoj restarigi kontaktojn kun Britio, Irano kaj Rusio, kie sekcioj estis nuligitaj, cele al restarigo. Similaj provoj akiri sekci-peton el Armenio, Argentino, Kongo DR kaj pliaj landoj. Se peto atingos nian sekretarion kaj estraranon pri landa agado ene de la sekvaj kvindek tagoj, la komitato povos trakti tion dum nia konferenco.
- Klopodo aperigi ian materialon el nia sukcesa simpozio kun la Universitato de Kopenhago.
- Paŝoj por transigo de la presado kaj dissendo de *Juna amiko* el malpli kosta lando. Daŭrigo de la ĝis nun sensukcesaj provoj trovi varban direktoron, retejan prizorganton kaj novan redaktoron por duono de la revuo. Instensigo de varbado ankoraŭ por 2012.
- Porto de la nova multlingva retejo de ILEI al lanĉopunkto.
- Kaj multo plia...

Ni invitas niajn membrojn, sekciestrojn, komisionanojn kaj partnerojn aktive kunlabori kun ni, por ke nia trijara periodo portu kiel eble plej multan utilon al nia ligo kaj al la eduka programo de la movado!

Kore,

Stefan MacGill, prezidanto de ILEI



Bildo el la Juna amiko 2011/3.



La ŝtona arbaro: unu el la ekskurso-celoj dum la 45a ILEI-konferenco.